

# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 9 Eberswalde 1985-03-20

Pri kunveno de anoj de forstista laborgrupo okaze de IFER`85.

- Pri la statio de la terminologia laboro:

Ĝis la fino de 1984 estis preparitaj kaj elsenditaj 435 nocioj (slipoj). Nun estas skribataj la sekvontajn numeroj. Estas nia celo eldoni ĝis la fino de 1985 la slipojn ĝis la numero 600. La difinoj jam estas preparitaj. La stadio de la resendado de la slipoj estas diversa, kiel la superrigardo montras (vidu sube).

La prilaborado de Esperantaj proponoj en la malgranda komisiono estas la tre malfacila kaj tempokonsuma laboro. Ĝis nun s-ano Marinov 200. S-ano Marinov jam resendis sian opinion. La laboro daŭriĝas. Pokaze ni publikos la rezultatojn en FI.

- Ni ĝojas, ke nia sveda kunlaboranto s-ano Ribers trovis pliajn helpentojn por ellabori la terminojn. Tie ni vidas evoluon, kian ni ankaŭ trovas aliloke. Unuopaj kunlaborantoj organizas la kunlaboranton de fakuloj, esperantistaj kaj neesperantistaj, kaj tiel kunigas la potencon de fakuloj el deversaj landoj. Estas dankinde, ke s-ano Pachter ekkontaktis kun docento d-ro Ucar el la Istanbula forstscienca fakultato. D-ro Ucar ne estas esperantisto, sed interesiĝas kompletigi niajn multlingvajn slipojn per turkaj terminoj. S-ano Pachter ekkontaktis ankaŭ kun la pola magisterinĝeniero Pacholczyk, instruisto en forstteknikumo. S-ano Pacholczyk intencas partopreni nian laboron. Tiel ni havus plian polan kunlaboranton. El Rabat (Maroko) anoncis sin sciencisto de la tiea forsta esplorinstituto, kiu partoprenos nian agadon. Sed ĝis nun ekzistas manko rilate kunlaborantojn kun angla, rumana, hispana, portugala, kaj itala gepatraj lingvoj. Kompreneble ankaŭ kunlaborantoj el Finnlando kaj Norvegio estas dezirataj, ĉar ni ankaŭ envicigas finnajn kaj norvegajn ekvivalentojn, se ni trovas la nociojn en vortaroj.

- En FI 8 ni skribis, ke ni aspiras la utiligadon de la forstaj terminologioj verkitaj kadre de la JUFRO-laborgrupo 6.03. En Eberswalde ni havas nur la anglalingvan version de 1971. Se ni laŭ la difino en la angla versio konstatos samsencon de termino, ni enmetos la respektivan numeron de la JUFRO- terminologio en la slipon.

- La spertoj montras, ke estas grave kontroli lingve la terminojn fare de kelkaj lingvistoj. Ĝis nun ni havas nur unu proponon. Tial ni proponas la sekvantan vicon: Ni atendas kromajn proponojn.

- Ni interkonsiliĝis pri la vico, pri la sinsekvo de la lingvoj sur la dua eldono de la slipoj kaj en la pli malfrua vortaro. La unuan lokon havu la Esperanta termino kun la difino. La duan lokon havu la germana termino kun la difino. Por la aliaj lingvoj estas sen- coplene vicigi ilin laŭ la lingva parenceco, do germana (post la germana difino), romana, slava, fino-ugra ktp., kaj en la unuopaj grupoj laŭ la alfabeto vico.

es	an	fr	bu	fi	Tu
ge	no	hi	Ĉe	hu	
	sv	it	po		
		rm	ru		
			Sl		

- Por ŝpari paperon ni intencas elsendi en la estonteco nur po unu slipon, kiu restos ĉe la kunlaboranto. Al Eberswalde nur sendu listojn (laŭeble trifojaĵojn), kiuj enhavu la numerojn, la Esperantotermojn kaj la konformajn terminojn (resp. korektaĵojn de eraroj) en la naciaj lingvoj. Tiel ni ankaŭ plimalgrandigos la sendkostojn.

- La sekvonta Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko okazos en Ŝilina (ĈSSR) sub la ĉeftemo: Raciigo de produktado, direktado kaj ekonomio. Ni proponas, ke la forstistoj pripensu partopreni kun kelkaj prelegoj. La sekvonta kunveno de nia laborgrupo estos dum SAEST en 1986.

- S-anino Kovalëva skribis: "Mi volas probonial ĉiuj kunlaborantoj konatiĝi. Necesas ...? iu homo fotojn, kaj poste prepari komunan fotoĵon, poste resendi por ĉiuj." Ni konsentas. Tiu estas bona propono. Ĉiu kunlaboranto sendu al s-ino Valentina Kovalëva, SU 630055 Novosibirsk-55, a/k-44 po unu (nigra blankan) pasportan foton.
- S-ano Sigurdsson el Reykjavik estas naturamiko, kiu ŝatas arbojn. Li observis dum kelkaj jaroj la agadojn de la forstista laborgrupo kaj skribis: "La meztemperaturo en suda Islando estas 11-12°C en Julio. Kiam Islando ekloĝiĝis antaŭ 1100 jaroj la lando estis kovrita de betularbaro ĝis 600 m alteco. Nun la plej gradaj arbaroj estas en Fnjókadals en meza norda bordo, kaj en Hallormetad en orienta Islando. La aliaj partoj de la lando estas preskaŭ nudaj de arboj. Portio verŝajne kulpas brutaro, ĉefe ŝafoj. Dum la lastaj 75 jaroj la Islandaj arbaristoj importis multajn fremdlandajn specojn de arboj. Kelkaj, kiel la lariko de Archangelsk bone prosperas, sed la plimulto ne, ĉar la klimato ne permesas bonan kreskedon." S-ro Sigurdsson nun sendis al ni jarlibron de la islandaj forstistoj, kiu montras la varajn agadojn de tieaj forstistoj.

La malgranda komisiono proponas la sekvantajn terminojn:

0001	forhakado de ŝvelitaj radikbazoj;	#	cilindrigo de la trunkbazo
0002	forbruligi	0020	formortanta
0003	forbrugligo	0021	senarbigita
0004	fortransporti (krudlignon)	0022	markita por la sekcado
0005	restaĵforigo	0023	senpintigita
0006	lignorestaĵo arborestaĵo trunkrestaĵo	0024	engresigli foruzi paŝtigante
0007	branĉara restaĵo	0025	dehaki
0008	dispecigilo por lignorestaĵoj	0026	dehakado
0009	interceptio	0027	trunkbeza tranĉfaco
0010	fortransporto	0028	enarbigi
0011	Permeso pri fortransporto: licenco " "	0029 0030	egkonusa eg-konusa egkonuseco eg-konuseco
0012	limdato " "	0031	senarbigi
0013	kostoj " "	0032	senpintigo
0014	tarifo " " takso " "	0033 0034	forpinĉi (la flankajn ŝosojn malŝarĝilo)
0015	reglamento pri "	0035	lignodeponejo
0016	forsta strato arbarstrato	0036	(trunk)segmentado
0017	kontrakto pri la fortransporto	0037	markado por la sekcado
0018	periodo de " "	0038	mezurbastono
0019	disdono de krudligno		

#### Listo pri senditaj kaj ricevitaj slipoj

	send.	ricev.	send	ricev
Berger	382...435	382...435		
Danilin	382...435			
Kovalëva	328...381		382...435	382...435
Marinov	382...435	382...435		
Maserov	382...435	382...435		
Moudry	382...435	parte		
Pachter	382...435	382...435		
Oroszi	382...435	382...435		
Ribers	382...435			
Svoboda	272...327		328...381	
Ullrich	382...435	382...435		
Váňa	382...435	382...435		

K.-H. Simon